

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 503

SEPTEMBRO 1947

KONGRESA NUMERO

ARBOJ DE LA ARBARO KAJ KAMPO

de FRANK BOOTH

Jen tre bela libreto kiu priskribas kelkajn arbojn de Eŭropo.

Ĝi enhavas 15 belajn ilustraĵojn de Edith R. Turlington.

Prezo 1 ŝil. 10 p., aŭ 7 respondkuponoj, afrankite.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du penco por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponono por ĉiu duo da vortoj.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amiko)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (en Esperanto kaj kelkaj Eŭropaj lingvoj) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Germana Esperantisto, librokomercisto 59-jara, deziras korespondi tutmonde. Certe respondos. Peter Hochbruck, Kaiserstr. 36, (17a) Karlsruhe, U.S. Zono, Germanujo.

La Gildo de Sankta Ajdan havas intereson eble por vi. Legu la senpagan broŝuron pri niaj celoj. Ajdanestro, Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Instruistoj-desegnistoj, atentu! Ni kolektas desegnaĵojn de 11-15-jaraj infanoj el la tuta mondo. Al ĉiu kiu sendos al ni 10 desegnaĵojn ni tuj sendos la saman kvanton el Ĉeĥoslovakujo. Sendu multnombro! Adreso: Direktoro de la eksperiment-lernejo en Batov, Ĉeĥoslovakujo.

23-jara Germana Esperantisto deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Kurt Klatt, (24) Flensburg, Norderhofenden 3 bei Pfannenstiel, Brita Zono, Germanujo.

Kiu povas doni informon pri: O. Gefr. Karel Georg Windhouzen, naskita 21-7-1923 en Ubach over Worms, gem. Waubach; lasta ricevita adreso estis 12 Aŭgusto 1944: L 35780 Lg. Pa Wien.—kaj Leonard Jozef Windhouzen, naskita 16-7-1926 en Ubach over Worms, gem. Waubach; lasta ricevita adreso estis letero el Parizo, L 43538 Lg. Pa Paris. Ambaŭ personoj servis en la Germana armeo. Novajojn bonvole sendu al S-ro C. Janknecht, Vossenstraat 7, Brunssum, Nederlando.

F-ino Gertrud Burster, (17a) Karlsruhe (Baden), Rheinstr. 105, U.S. Zono, Germanujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj per poŝtkartoj ilustritaj kaj leteroj.

Ĉina filatelisto Kaiĝi Ĉin havas novan adreson: Nankina Esperantista Klubo, P.O. Box 531, Nanking, Ĉinujo. Ege li dankas ĉiun korespondam(in)on kaj petas pardonon pro responda prokrasto pro malsano.

Fotoamatora artisto interŝanĝas kaj korespondas: S-ro Brezsán Julio, Safarikova-ul. 7-I, Novi-sad, Jugoslavujo. Nur pri fotoarto.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi tutmonde Mauricio Rosé, Avenida Rio Branco 147, Rio de Janeiro, Brazilo.

Skoltoj anglaj volas korespondi kun skoltinoj alilandaj. Skribu Marvin, Colony, Lingfield, Surrey, Anglujo.

Petro Stojan sendos Esperante skribitan libreton, verkatan laŭdezire pri teorio, historio de lingvoj: Esperanta, Rusa, Vindiana, Sanskrita, ankaŭ alia temo elektota. Sendu ses respondkuponojn: P. Stojan, Escarene, Alp., Mar., Francujo.

Modpeltisto deziras korespondi kun samprofesianoj. Johano Bányay, Oroslán u. 2, Szeged, Hungarujo.

Kursanoj el diversaj profesioj kaj kun diversaj interesoj deziras korespondi kun komencantoj el diversaj landoj. Kurt Götz, (24b) Büdelsdorf-Rendsburg, Mühlenstr. 6, Brita Zono, Germanujo.

27-jara Finna fraŭlino deziras korespondon kun ĉiuj landoj. Esperantaj kaj anglaj leteroj bonvenaj. Certa respondo. F-ino E. Salovaara, Uusikatu 33, Oulu, Finnlando.

Franco, 23-jara, 1.92 metrojn alta, bruna, ateista, naturista, legema, sportema, varmlande vojaĝema, deziras edziĝi kun altaĝa samideanino. Potiron, 7 Rue Marchand, Vannes, Francujo.

50 gekursanoj (junaj kaj maljunaj) novaj kaj malnovaj Esperantistoj deziras korespondi. Esperanto-grupo Nürnberg, Hans Raab, Austrasse 84, (13a) Nürnberg, Bayern, U.S. Zono, Germanujo.

La unuan lertespereron aranĝos bonhumora rondeto la 4-an de Oktobro. Skribu amase al Esperanto-grupo Nürnberg, Hans Raab, Austrasse 84, (13a) Nürnberg, Bayern, U.S. Zono, Germanujo.

Ernst George, Berlin N 65, Nachtigalplatz 28, Germanujo, deziras interŝanĝi leterojn kaj pm.

Ano de Laborista Partio deziras korespondi kun unu serioza Esperantisto en ĉiu lando pri la regado en la lando kaj kiom ĝi rilatas al la demokrata socialismo. S-ino Hilda de Vere, Bela Monto, Wrotham, Kent, Anglujo.

Atentu! Manuel De Nóbrega, Rua do Esmeraldo, 28, Funchal-Madeira Insulo, deziras interkorespondadi kun adventistoj de ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Profesoro Marques Da Silva, Escola do Magistério Primário, Liceu de Jaime Moniz, Funchal-Madeira Insulo, deziras interŝanĝi p.m. kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. Nepre respondos.

Deziras korespondi pri pacaj kaj religiaj movadoj nuntempaj, pri esoterismo, pri okultaj kaj kuracaj fortoj de herboj. Jozef Arsenik, Warszawa-(24)-Praga, Zacisze, Palmowa 16, Pollando.

Mi informas kun bedaŭro la afablajn germanajn, hispanajn kaj portugalajn gesamideanojn, ke nuntempe la poŝttrafiko inter Hungarujo kaj iliaj landoj ne estas restarigita kaj tial mi ne povas respondi al iliaj leteroj. Ing. Georgo Bodnár, Budapeŝt, Hungarujo.

Sinjorino 30-jara deziras korespondi kun samideanoj precipe el okcidenta kaj norda Eŭropo, aŭ el Ameriko. Eventuale reciproka vizito dum la 1948-a libertempo. Eva Schenk, Budapeŝt VIII, Rákóczi ut 29.

Dana terkulturisto dez. kor. kun samprofesianoj kaj aliaj. Respondas al ĉiuj. Leteroj el ekstereŭropaj landoj, prefere Sudameriko, speciale interesas al mi. E. B. Larsen, Borggard, Sierslev pr. Store Heddinge, Danlando.

Esperanto-subgrupo Hannover-Herrenhausen, Claus-thaler Weg 10, Germanujo, deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Skribu al fakinstruisto Armin Schorch esperante, angle, aŭ germane; certe respondos. Bonvolu afranki filatele.

Amike korespondi pri diversaj temoj aŭ interŝanĝi belajn ilustritajn poŝtkartojn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj deziras 26-jara teknikisto. Certe respondos. Jaroslav Vesely, Svinařov 28 ĉe Kladno, Ĉeĥoslovakujo.

Korespondi kun tuta mondo deziras Marie Ambrožová, Sezimovo Ústí, pension, Ĉeĥoslovakujo.

Usona lernanto deziras korespondi per leteroj aŭ poŝtkartoj pri aferoj mondaj, lingvoj, kaj esperantaj gazetoj. James Douglass, 495 Almanza Drive, Oakland 3, California, Usono.

Fratinoj deziras korespondi. Manka, 20-jara brunharulino kaj ĵitka, 16-jara helharulino. F-ino M. aŭ J. Zahourová, Karlovy Vary (Carlsbad)-Rybáře, Dr. Ed. Beneš 4, Ĉeĥoslovakujo. Respondo garantiata.

ESPERANTO

INTERNACIA REVUO ESPERANTISTA

N-ro 503

KONGRESA NUMERO

SEPTEMBRO 1947

ADIAŬO DE DU PREZIDANTOJ

Adiaŭ ! Malgajiga vorto !

Oni diris al mi : Ĉar vi estis prezidanto de I.E.L. vi nun devas adiaŭi la Komitaton kaj la Esperantistan publikon. Mi serĉis en vortaro, kaj trovis : *Adiaŭ, esprimo uzata kiam oni definitive disiĝas.*

Ĉu vere mi devas adiaŭi vin, karaj komitataj kolegoj, miaj kunlaborintoj dum multaj jaroj ? Vin, kies bonorda kaj lojala disciplino ebligis, ke ni alfrontu gravajn malfacilaĵojn ? Vin, kiuj bonvolis nomi min Honorprezidanto, por ke inter ni restu ligilo ?

Ĉu mi devas adiaŭi cin, kara Esperantista publiko, kies grandanimajn sentojn mi vidis elkorigantaj, kiam en niaj kunvenoj ni diskutis pri efektivigo de niaj idealoj ? Mi bone konas cin, cian pasion por ĉio bona, ĉio bela, ĉio justa, ĉio alta ; kiam ci trovis la vojon, oni povas fidi al cia instinkto.

Ne ! Ni forpeli tiun adiaŭon ! En buŝa lingvo ni havas ĉarman esprimon *ĝis la !* Kia esperplena vorto ! Ĝis la venonta jaro, ĝis la baldaŭa renkontiĝo, ĝis la nedifinita sed certa okazo, kiu puŝos nin unu al alia.

Mi scias, kion signifas por ni tiu *ĝis la*. Ĝi signifas : Ni retrovos nin ĉe la okazonta batalo por triumfo de nia idealo, kaj, ĉar tiu batalo neniam ĉesas, *ĝis la* anoncas, ke ni tre baldaŭ retroviĝos.

Ne adiaŭ ! Ĝis la !

Berno, 1-an de Aŭgusto, 1947.

L. Bastien.

* * *

Deziro de veterano

Kun gaja koro mi forlasas Bernon, kie por la tria fojo kunvenis la Esperantistoj en internacia kongreso. Gaja, ne pro la fordonado de peza ŝarĝo, kia estis la prezidanteco de U.E.A. inter la jaroj 1937 ĝis 1947, sed gaja pro la atingita unueco. Mia rolo finiĝis, kaj laborinte dum preskaŭ 40 jaroj por Esperanto kaj U.E.A., mi opinias esti farinta mian devon. Batalinto mi estis, veterano mi estas nun.

Forpasis dek jaroj de kiam ni en Varsovio kunvenis kaj klopodis trovi bazon de rekuniĝo. Dek jaroj de teruro kaj de seniluziĝo pri homa faro. Starigis por mi, kiel por miaj kolegoj en la Komitato de U.E.A., la demando, ĉu ni daŭrigu tiun ĉi staton, ĉu efektive ne ekzistas ebleco rekunigi la du, I.E.L. kaj U.E.A. La tempo, tiu ĉi boniganto de multe da malbonaĵoj, efike kunhelpis kaj ankaŭ la bonvolo de la kunagintoj en la granda verko. Ne plu estas du sin interbatalantaj organizaĵoj, estas kaj estos nur unu. Konkordo estas forto !

El sperto ni lernu kaj ni sciu eviti estontece eraron. Aliaj malfacilaĵoj estos, sed vi ilin venkos, se vi scios labori en spirito de toleremo, de objektiveco, kaj de konkordo. Se vi havos tiun ĉi volon esti toleremaj, objektivaj, tiam sekvos konkordo. Tio estas mia deziro okaze de mia reiro en la vicon de la simpla batalanto por nia afero.

Berno, 2-an de Aŭgusto, 1947.

Hans Kürsteiner

32a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

BERNO, 26 JULIO—2 AŬGUSTO, 1947

Se la 32-a Kongreso estas antaŭdiraĵo pri la estonteco de nia movado, ni povas senrezerve diri, ke la 32-a estas bona, eĉ bonega aŭguro. Kiam ni kunvenis pasintjare en Berno por preparoli la organizon kaj la atendeblan sukceson, la subskribinto de tiu ĉi raporto opiniis, ke estos sukceso se partoprenos tri- ĝis kvar-cent Esperantistoj. Nu, la realaĵo estas la malo. Enskribiĝis preskaŭ 1400 kaj partoprenis iom pli ol 1200 personoj. Kaj ni aldonu, ke ĉio bone funkcias, regas plena konkordo, la iamaj *malamikoj* kondukatas kiel juna geedza paro. *Ĉio en butero* por uzi enlandan diradon, ke ĉio estas bona.

Vendrede la 25-an de Julio jam alvenas la unuaj kongresanoj kaj en la stratoj jam vidiĝas portantoj de la verda stelo. En la akceptejoj stacidoma oni povas senti la atmosferon de la Esperantista Kongreso. Malnovaj amikoj renkontiĝas post kelkjara disiĝo, oni babilas, ĝojas, ridas. Bonega ideo, aranĝi la interkonatiĝan vesperon en la vasta Kornhauskeller (t.e. kelo de la grendomo). Ĝi estas plena de Esperantistoj, la konversacio tiom vigla ke la muziko ne sukcesas venki la bruon de la parolegantaj homoj. La konsumado de trinkaĵoj estas rekorda ne nur pro la eksterordinara varmego, sed ankaŭ pro la seninterrompa babilado de la kongresanoj. Ni aldonu, ke ĝenerale oni aŭdas Esperanton; evidente la novaj samideanoj volas dokumenti sian scion de la lingvo.


Iom glatigas la ondegojn de parolo la kantado kaj jodlado de kantista unuiĝo, kiu prezentas kantojn en enlandaj lingvoj kaj en Esperanto. Naciaj kostumoj jam vidiĝas kaj precipe rimarkindaj inter ili estas Ĉeĥoslovakaj, Svedaj, kiuj konkuras je originaleco kun la Svisaj de Sankt Gallen, Bern kaj Valdo.

Belega neforgesebla vespero, esperiga komenco de la 32-a.

LA MALFERMO

Dimanĉe, 27-an de Julio, akurate je la deka horo Sinjoro Generalo Bastien malfermas la kongreson. Esprimante la ĝojon, ke la unua postmilita kongreso okazas ĝuste en la sama urbo kie okazis la 31-a, li transdonas la parolon al Sinjoro Ed. von Steiger, ano de la konfederacia registaro. Komencante germanlingve kaj daŭrigante franclingve, S-ro von Steiger komunikas la saluton de la Svisaj kantona kaj urba registaroj. En bela parolado, klara kaj konvinka, li konstatas ke Esperanto estas tiu ĉi sinteza lingvo, kiu estas plej ofte uzata en internaciaj kongresoj kaj rilatoj. Esperanto estas vivanta lingvo kaj

ekzistas veraj oratoroj, kiuj esprimas sin elegante kaj facile kiel en kiu ajn nacia lingvo. El sia propra vivo S-ro von Steiger rakontas ke li, kiam li estis juna advokato, renkontis en vagonaro inter Berno kaj Zurigo deputiton, socialiston. Tiu ĉi, vidante libron en la mano, demandis, "Kion vi legas, mia kara Steiger?" Tio estis volumo de historiisto Ranke *Historio de la papoj*. Li diris, "Mian tutan konsideron, almenaŭ tio ĉi ne estas banala. Sed jen, mi havas ion, kio estas pli bona. Ĉu vi scias, kion mi legas?" Kaj li montris volumon da korespondaĵoj en Esperanto, kiun li, Svisa socialisto, havis kun Rusa princo. "Vidu, mia kara Steiger," li diris, "estas tre bone fari historion, sed oni devas rigardi en la estontecon. Oni ne devas perdi tempon pri la pasinteco. Estas la lingvo Esperanto, kiu allogas min. Estas Esperanto, kiu ligas min kun la Rusa princo. Li posedas belegajn bienojn en la Krimeo kaj invitas min libertempi tie; estas Esperanto, kiu finfine forgesigas al ni ĉiujn diversecojn de lingvo, raso kaj politika koncepto."




Ed. von Steiger

Esprimante sian fidon al niaj ideo kaj celo, S-ro von Steiger finas: "Mi deziras ke via idealo realiĝu, kaj ke vi Esperantistoj estu inter la pioniroj plej firmaj de feliĉa estonteco, dezirata de ĉiuj."

Varma aplaŭdo sekvas la parolon de la Svisa registarano, poste legitan en Esperanto de samideano Walder.

Sekvas la tradicia festparolado de la prezidanto de I.E.L. nuna U.E.A., Generalo Bastien. Komencante per la dankesprimoj al Svislando kiu akceptis nin, al ĝia reprezentanto, la oratoro kore salutas Svislandon, insulon de paco meze de Eŭropo, popolon kun praktika idealismo, landon en kiu naskiĝis grandaj ideoj, kia la Ruĝa Kruco, landon en kiu sidas la centroj de internacia agado, kia ekzemple, la Poŝta Unio. En tia lando, kaj precipe en ĝia ĉefurbo, la Esperantistoj sentas sin hejme. Sincera gratulon kaj dankon al la organizantoj, al Direktoro Buchli, kaj al liaj kunlaborantoj. Spite la sennombrajn komplikojn, ili fidis, laboris kaj sukcesis. Tiu ĉi sukceso estu ilia rekompenco.



Li salutas Sinjorinon Wanda Zamenhof, la bofilinon de nia Majstro kaj li esprimas la senton de ĉiuj, komunikante la kunsenton de la Esperantistaro al ŝi.

Traktante la jarojn inter la 31-a kaj la 32-a Kongresoj, Generalo Bastien memorigas la mal-feliĉon, kiun semis malamikoj de la homaro, kaj aludante pri la multaj viktimoj Esperantistaj, li invitis je momento de silento.

Post tiu ĉi giganta pasivaĵo de nia movado, la Prezidanto citas la aktivajn: la kunfandiĝon de I.E.L. kun U.E.A., alivorte la finon de konflikto. Li parolas pri la detala diskuto ĝisfunda, la longa korespondado, klarigado, esplorado, kiun fine kronis la sukceso. La kunfandiĝo nun estas realaĵo. Ekzistas nur unu organizaĵo Esperantista neŭtrala kaj ĝia nomo estas

Universala Esperanto-Asocio

Dankon al tiuj, kiuj ne malesperis, kiuj persistis kaj eltenis. Al ili ni ŝuldas la atingitan unuecon. Necesis granda laboro teknika, plenumita plejparte de nia Ĝenerala Sekretario, C. C. Goldsmith, al kiu iru nia danko.

Ni bezonas la unuecon ĉar ekstaras novaj kontraŭuloj ideoj. Nova internacia lingvo baldaŭ aperos el la laboratorio de I.A.L.A. (internacia asocio pri helpa lingvo) kaj provos gajni la mondon. Nia devizo estas klara kaj ĝi tekstas: Ni estu pretaj!

Je la fino de sia parolado, Sinjoro Bastien citas parolon de nia Majstro en la kongreso Krakova, 1912: "Laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo *kiu plej laŭte krias, tiu estas prava*. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigos nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komuna interkonsentita decido. Sed ni neniam semu en nia tendaro reciproke malamon kaj malpacon,

En finparolo, Generalo Bastien invitas la Esperantistaron esti toleremaj. *Paco per toleremo*, per tiuj ĉi vortoj li faras lastan peton al la Esperantistaro.

Longa ĉiam ripetiganta aplaŭdo montras, ke la kongresanaro komprenas ne nur laŭvorte sed laŭsence la oratoron.

.

Sekvas la elekto de la kongresa estraro. Estas elektita kiel Prezidanto de la Kongreso, Direktoro Buchli la prezidanto de la L.K.K.; Vicprezidantoj, Hans Kürsteiner, kaj S-ro Liechti, prezidanto de la Svisa Esperanto-Societo; Sekretarioj, S-roj Goldsmith kaj Nicolaisen.



H. Buchli

Sinjoro Buchli, okupinte la prezidantan seĝon, resumas la plenumitan laboron, esprimas sian dankon al la Esperantistoj, kiuj respondis la alvokon al Berno, kaj deziras al ĉiuj agrablajn kongrestagojn. Skizante la pasintajn ok jarojn de 1939 ĝis 1947, la parolanto memorigas la terurajn okazaĵojn kies atestantoj ni estis kaj kies originon li vidas en la nacia egoismo, la megalomanio de iuj gvidantoj kun erarigitaj popoloj. Sed oni ne povas daŭre rigardi en tion kio pasis. Ni devas rekonstrui materie kaj morale, kaj en tiu ĉi moral-spirita rekonstruo nia movado povos alporti sian brikon. Sed ĉar ni ne estas multenombraj por decide influi amasojn, ni devas kreskigi la nombron de nia adeptaro kaj tio postulas, ke ni senĉese propagandu kaj varbu. Finante siajn decidajn vortojn, la oratoro profete ekkrias: "Mi kredas, ke ni ĉi tie en Berno staras antaŭ alternativo, ke decidigas la estonteco de nia movado. Pro tio mi deziras al vi kaj al ni forton de la penso, energion ĉe la volo kaj celkonscion de la agado."

Longa aplaŭdo sekvas la parolon de la energiplena kaj dinamisma kongresprezidanto.

Kaj nun venas la salutparoloj de la senditoj de la registaroj. Transdonas la salutojn kaj deziron pri sukceso:

Aŭstra registaro: Direktoro Paul Glüxmann
Ĉeĥoslovaka Prezidanto—D-ro E. Beneš: S-ro Jan Geryk

Ĉeĥoslovaka registaro: S-ro D. Bartošik

Nederlanda Ministerio por Rekonstruado: S-ro J. R. G. Isbrücker

Norvega registaro: Kapitano Bugge-Paulsen

Sveda registaro: Rektoro Karl Söderberg

(Manko de spaco malebligas, ke ni represu tute aŭ parte la parolojn de bondeziro).

☛ Sekvas la tradicia transdono de salutoj al la Kongreso. Kiel unua parolas

Sinjinoro Wanda Zamenhof

edzino de D-ro Adam Zamenhof, filo de nia Majstro. Kun tremanta voĉo la bofilino de la kreinto de Esperanto memorigas, ke ŝi parolas kiel unu el la malmultaj anoj de la familio Zamenhof, kiu estas savita el la ungegoj de senkompata reĝimo. Ŝi dankas pro la varma kaj elkora konsento de la Esperantista publiko, kiun oni montris al ŝi kaj al ŝia filo Ludoviko.

La vico estas al la delegitoj de la Landaj Asocioj Esperantistaj. Salutas nome de:

Argentina Esperanto-Ligo: S-ro A. Vila Maynon
Aŭstria Esperanto-Federacio: Kalkulkonsilanto R. M. Frey

Reĝa Belga Ligo Esperantista: F-ino Jennen
Brita Esperantista Asocio: F-ino M. Jay
Bulgara Esperanto-Asocio: S-ro D-ro Ĝuĝev
Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista: S-ro Malik (radioparolanto)

Dana Ligo Esperantista: S-ro Fink-Jensen
Franca Esperantista Unio: S-ro J. Guillaume (Greka) Helena Esperantista Asocio: D-ro A. Stamatiadis

Hungarlanda Esperanto-Federacio: S-ro Julio Baghy

Irlanda Esperantista Asocio: S-ro L. O hUiginn
Islando: S-ro O. P. Magnusson

Itala Esperanto-Federacio: P. Modesto Carolfi
Jugoslava Esperanto-Ligo: D-ro Ivo Lapenna
Maroko: S-ro B. S. Ohana

(Nederlanda) "La Estonto Estas Nia": S-ro Baas

Norvega Esperanto-Ligo: S-ino Broekman-Slötteröd

Nov-Zelanda Ligo Esperantista: F-ino Rogerson (parolanta en la dua laborkunsido)

Palestina Esperanto-Ligo: S-ro T. Kohen-Cedek

Pola Esperanto-Asocio: S-ro Isaj Dratwer

Sveda Esperanto-Federacio: S-ro J. Strönné

Svisa Esperanto-Societo: S-ro F. Liechti

Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko: S-ro Schroeppel

La salutparoloj, limigitaj je du minutoj, ĝenerale esprimas la ĝojon pri la atingita unueco de la neŭtrala Esperanto-movado. Apartan atenton ricevas la elokventa verva parolo de D-ro Lapenna, kiu vipas la faŝismon kiel kulpan pri la dua mondmilito, kaj kulpan pri la mortigo de miloj da viktimoj Esperantistaj.

Post ĉi tiuj salutparoloj la Ĝenerala Sekretario, S-ro C. C. Goldsmith, legas telegramojn ricevitaĵn. Bondeziras la kongreson :

Ludoviko Zamenhof, nepo de la Majstro
Teo Jung, Redaktoro de *Heroldo de Esperanto*
Paul Blaise, Komitatano de U.E.A., Liverpool
Egipta Esperanto-Asocio, Cairo
Harald Thilander, blinda Esperantisto, Stockholm

Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana
Slovaka Esperanto-Societo, Bratislava
Sydney Esperanto-Societo, Aŭstralio
Palestina Esperanto-Ligo, Jerusalemo
Orebro Esperanto-Societo, Svedujo
Paul Nylén, Huddinge, Svedujo
Federacio de Internaciaj Organizaĵoj en Genève
Svisa Konsilantaro por Paco

Ni krome menciuj bondezirojn per telegramoj plejparte en Esperanto, de la Bahaa movado en Cairo, de Shogi Rabbani en Haifa, de Rowhani en Teheran, de Adelaide, Romo, New Delhi, Nederlandaj Bahaanoj en Amsterdam, de Stockholm, Oslo kaj fine de la Britaj kaj Belgaj Bahaanoj.

Centoj da leteroj kun bondeziroj al la 32-a alvenis en Bern kaj estas tute ne eble listigi ilin. Tamen, jen mallonga letero de D-ro Edmond Privat, kiu pro grava operacio ne povas veni al Berno :

“Neniam la homaro pli bezonis aŭdi la vokon de nia Majstro al kompreno de la profunda spirita unueco super ĉiaj baroj rasaj, gentaj kaj naciaj. Vivu kaj disvastiĝu lia inspiro. En penso kun vi tutkore, via Edmond Privat.”

Longa aplaŭdo sekvas la citon de la nomoj de la salutintoj.

Post lego de kelkaj komunikoj administrativaj pere de la Ĝenerala Sekretario, eksonas la orgeno. Plenkore kaj konvinke la kongresanaro kantas la himnon Esperantistan, la vokon al paco kaj konkordo, eternaj vortoj de D-ro Zamenhof.

Unua Laborkunsido, Lundo 28.VII.47

Kongresprezidanto Buchli malfermas tiun ĉi kunvenon signifoplenan en la historio de nia movado. Li transdonas la parolon al Prezidanto de U.E.A., Generalo Bastien, kiu koncize informas pri la efektivigo de la kunfandiĝo. Li esprimas sian ĝojon pro la atingita interkonsento, kaj estas certa, ke ni nun iras sur vojo de regula evoluo. (Longa aplaŭdo).

Daŭrigante, Generalo Bastien atentigas, ke pasis 13 jaroj de kiam li akceptis en Stockholm la ŝargon de U.E.A. prezidanto. Tre multo okazis dum tiuj ĉi jaroj, malpaco ĉie, malpaco inter la Esperantistoj. Ke tio nun finiĝas estas ĝojige. Plenuminte sian devon, Generalo Bastien informas pri sia firma decido ekŝigi, kaj tion la Komitato de U.E.A. jam akceptis. Pli junaj

fortoj nun gvidu la ŝipon de U.E.A. La Komitato en sia dua kunsido elektis kiel prezidanton de U.E.A.


Sinjoron Ernfrid Malmgren

al kiu nun transiras la tasko.



Ernfrid Malmgren

Longa ovacio sekvas la vortojn de Generalo Bastien, kiu retiriĝas kaj cedas la seĝon de prezidanto al Ernfrid Malmgren. La nova prezidanto emocie skizas la sindonan laboron de la eksiginta prezidanto, kaj esprimas al li la dankon de la Asocio kaj de la Komitato. La Komitato de U.E.A. decidis nomi Sinjoron Bastien kaj Sinjoron Kürsteiner honoraj prezidantoj de U.E.A. pro la gravaj servoj faritaj.



Hans Kürsteiner

Longa aplaŭdo sekvas tiun ĉi informon. La du Honoraj Prezidantoj, unu post la alia esprimas per kelkaj vortoj sian dankon.

Prezidanto Malmgren nun informas pri la unuaj decidoj de la nova komitato de U.E.A. Tiu ĉi elektis kiel Vicprezidanton

D-ron Paul Kempeneers

kaj kiel Estraron de U.E.A. la samideanojn Jakob, Kennedy, Lapenna, Oliver kaj Petit, kune kun la Prezidanto kaj Vicprezidanto, tio estas sep membroj.

La Komitato de U.E.A. nun konsistas el:
Kategorio A—anoj elektitaj de la Landaj Asocioj

Argentino	T. Sekelj
Aŭstralio	L. E. Pfahl
Belgujo	P. Kempeneers
Brazilo	C. Domingues
Britujo	D. Kennedy, B. E. Long, A. C. Oliver
Bulgarujo	St. Ĝuĝev, A. Grigorov
Ĉeĥoslovakujo	J. Vondroušek
Danujo	St. Fink-Jensen, O. Lange

Francujo
Italujo
Jugoslavujo
Nederlando
Norvegujo
Svedujo
Svisujo
Usono

J. Guillaume, R. Levin, P. Petit
G. Canuto
I. Lapenna, J. Kozlevčar
P. W. Baas, F. Weeke
Kap. R. Bugge-Paulsen
E. Malmgren, J. Stenström
F. Liechti
G. A. Connor

Kategorio B—anoj elektitaj per voĉdono de la Delegitoj

E. Adamson, D. Chagnoux, H. Jakob, V. Setälä, P. J. Soeters

Kategorio C—alelektitaj

E. Dahl, J. Saldanha Carreira, D-ro E. Privat, J. D. Sayers, J. Baghy

La Ĝenerala Sekretario informas pri la skribaj bondeziroj ricevita, sed ne estas eble listigi ĉiujn. Tamen la najlon trafas sur la kapon, salutante la kongreson, la Lodza Grupo de Pola Esperanto-Asocio, kiu sendas belan desegnaĵon, kies reprodukto aperas, iom malgrandigita, en la nuna numero.



Dua Laborkunsido, Mardo 29.VII.48

Malfermas tiun ĉi kunsidon en la Granda Salono de la kongresejo, Prezidanto Malmgren. La unika punkto de la tagordo estas

Propagando

La Prezidanto donas la parolon al S-ro Székely el Budapeŝt. Li laŭtlege ampleksas tezon pri metodoj de moderna propagando de Esperanto,

kiun oni povas resumi en la vortoj : Propagando ĉia, ĉiam, ĉie kaj ĉiel. La kongresanoj atente sekvas la vortojn de la preleganto kaj ofte interrompas per esprimoj de konsento. La prelego tuŝas ĉiujn eblojn de la propagando ; artikoloj por la gazetaro, kursoj en gazetaro, prelegistoj, kursoj, ekzamenoj, universitato por Esperantistoj k.a. (aplaŭdo).

Parolas la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. S-ro Goldsmith informas pri la petskribo al U.N.O. Ĝis nun preskaŭ 300,000 subskriboj estas kolektitaj kaj pliaj centmiloj sekvas. Por kovri parton de la kosto li proponas vendon de lotoj pokajere en la kongreso. La kunveno akceptas la sistemon proponitan, kiu konsistas el numeritaj lotoj vendataj en kajeroj, en kiuj troviĝas 22 kvitancoj. Prezo de kajero estas dek frankoj. La naŭ gajnontoj en la loterio rajtas ricevi premiojn, kiuj estas : Dumviva membreco de U.E.A., kompleta kolekto de proksimume 36 altvaloraj libroj eldonitaj de Esperanto Publishing Company, Plena Vortaro de Esperanto, kaj laste ses libropremioj.

Li krome esprimas la esperon, ke multaj samideanoj sendos donacojn por la petskriba kaso, ĉar la projekto kostas multe pli ol oni antaŭvidis.

Post tiu ĉi informo, kompletigita de la prezidanto, tiu ĉi donas la parolon al S-ro Lapierre, Parizo, kiu informas pri farita propagando diversspeca en tiu urbo.

Lin sekvas Sinjoro E. Dahl, kiu per forta voĉo, kiu tremigas la domon, komparas la propagandilojn kiujn ni uzas kun diverskoloraj pomoj, el kiuj oni elektas la plej bonajn. Li insistas, ke oni sin turnu al la junularo ĉar la plenkreskuloj estas nur malfacile varbeblaj. Ili prezentas la pasintecon, la junularo la estantecon kaj la estontecon. Li krome rekomendas, ke oni utiligu la adresmaterialon kolektitan per la petskribo al U.N.O., precipe la adresojn de instruistoj. (Danka aplaŭdo).

Parolas Olafur S. Magnusson, Islando, kiu opinias ke la ĝisnuna propagando estas blinda. La venko dependas de ni mem kaj de la metodoj uzataj. Oni starigu ĝeneralan propagandan komitaton.

Fino Noll, Kopenhago, rekomendas, ke ni atentigu pri la ekonomia valoro de Esperanto ĉe konferencoj internaciaj, kie la multlingveco estas multekosta kaj tempoperda ĝenaĵo.

S-ino Wittenberg insistas, ke oni ne serĉu gajni por nia afero personojn kiuj ne bezonas Esperanton.

S-ro Makkink, Nederlando, diras, ke ni ne agu kiel simioj, por ke oni ne nomu Esperanton *simia lingvo*.

D-ro Ivo Lapenna, kies voĉo ne bezonas laŭtparolilon, diras ke Esperanto estas simila je telefono. Ĝia praktika valoro plialtigas kun la nombro de ĝiaj uzantoj. Por Esperanto la du karakterizaĵoj, kvalito kaj kvanto, estas nedisigeblaj. Nia sukceso dependas de tri kondiĉoj aŭ etapoj : Propagando, Instruado kaj fine la plej grava—la konservo de la gajnitaj kaj instruitaj homoj per daŭra uzado de la lernita lingvo.

S-ro Rud. M. Frey, la tria tondremulo en tiu ĉi kongreso, atentigas pri la progresoj de la propagando en Aŭstrujo. Tiu ĉi lando akceptis Esperanton, kaj li invitas fari tiurilatajn paŝojn ĉe la registaroj de aliaj landoj.

Je tio, Prezidanto Malmgren invitas, ke oni sendu proponojn al la Centra Oficejo en Rickmansworth.

Pri tute aparta propagandmetodo parolas D-ro Bader, de Basel. Li kunmetis *Pensojn* de Zamenhof en bele presita kajero, akompanitajn de tradukoj en pluraj lingvoj. Tiu ĉi libro kun aldonita ŝlosilo de Esperanto estas tute aparta propagandmaniero. Li krome rekomendas ke oni akcelu la eldonon de novaj ŝlosiloj, kaj eventuale modifu la enhavon kaj amplekson.

“Estu pretaj elspezi tempon kaj monon” tio estas la maksimumo de S-ro Vilĉjo Verda. Li opinias, ke ĝenerale ĉiu venis kvazaŭ hazarde al Esperanto. Li krome informas pri la Esperanto-semajno en Leeds kaj deziras ricevi objektojn por ekspozicio.

S-ino Yelland invitas studi la problemon de Tutmonda Kalendaro.

Pri la Konferenco de Mond-Unuiĝo en Montreux donas kelkajn detalojn S-ro Petit, kiu invitas sendi reprezentantojn.

Parolas S-ro Blazek, el Ĉeĥoslovakujo, pri gazetaro. Laŭ li oni devas, agante ĉe la gazetaro, ne cedi facile, sed persisti tiel, ke la redakcioj fine volos aŭskulti nin kaj akcepti niajn artikolojn. Li opinias, ke necesas normigi la insignojn, kaj fine demandas kial la komercistoj ne kunvenas tie ĉi.

Lin sekvas S-ro Huber, Aŭstrujo, parolante pri la propagando ĉe radio kaj gazetaro.

S-ro Conkovski, Bulgarujo, invitas propagandi ĉe komercaj institucioj, opinias, ke la interŝanĝoj de profesiaj spertoj inter samprofesiaj internaciaj havas altan propagandan valoron. Li ekzempligas Bulgarajn kaj Anglajn teksistojn.

S-ro Ohana, Maroko, opinias ke oni devas varbi por nia afero jam en sia propra familio.

Informas pri la propagando en Hungarlando, S-ro Bleier, frato de Vilmos Bleier. Li insistas,

ke la Komitato de U.E.A. gvidu la propagandon grandskale. Laŭ li la plej bona propagando estas la uzo de Esperanto.

Sekvas lin S-ro Zawada el Varsovio, kiu en ok punktoj resumas sian vidpunkton pri propagandaj metodoj.

Temperamenta juna samideano el Aŭstrujo, S-ro Vokal, volus, ke oni ne daŭre parolu pri tio, ke *oni* faru, *oni* klopodu, sed ke *oni mem* faru ion. Rimarkigas pri la sukcesoj en Aŭstrujo, kie funkcias ŝtate nomita Ekzamena Komisiono por Esperanto. Atentigas, ke la tri organizaĵoj Esperantistaj en sia lando kunlaboras harmonie, kaj invitas ke la ekzemplo pri kreo de Societo de Amikoj de Esperanto por trovi monon estu imitata alilande. Ankaŭ sur la kampo de la kinejo bonegaj rezultatoj estas atingitaj en Aŭstrujo ; simile pri la radio.

S-ino De Vere rekomendas en la propagando ne daŭre diri, ke Esperanto estas tre facila, kvazaŭ ĝi ne bezonus seriozan lernadon.

Ĉe preskaŭ malplena salono parolas S-ino Wittenberg kaj aparte aludas tiun ĉi fakton, opinante ke ĝi montras mankon de intereso.

Per tio finiĝas la enhaviĉa dua laborkunsido, laciga pro du aferoj, ekstrema varmo kaj troiĉeco de la prezentita materialo kun longa vico de parolantoj.

Tria Laborkunsido, 30.VII.47

Ĝi devus okazi en la granda salono, sed pro la transformo necesa por la Internacia Balo, la tria laborkunsido okazas en la Burgerrattsaal (Salono de la Berna Burĝa Konsilantaro). Prezidas S-ro Malmgren, kiu atentigas pri la fakaj kunvenoj kies raportojn oni aŭdos en la Ferma Kunsido, Sabaton matene. Li transdonas la parolon al F-ino Rogerson, kiu transdonas la salutojn de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. (Pro miskompreno tiu ĉi salutparolo nur nun estas legata).

Estas proponate kaj akceptate sendi telegramon al Kongreso de S.A.T. en Aarhus. Ĝi tekstas: "La 32-a Universala Kongreso de Esperanto nun okazanta en Bern salutas vian kongreson, esprimas sian deziron pri pli intima kunlaboro kaj kontakto inter S.A.T. kaj U.E.A. gvidantoj en komuninteresaj aferoj. Plenan sukceson. Malmgren, prezidanto ; Goldsmith, sekretario."

La prezidanto alvokas enskribitajn parolantojn. Parolas S-ro Krolenbaum, Britujo, admonante ke ni estu praktikaj. Praktiko estas tio, kio estas farebla. Atentigas pri la instruado de Esperanto en lernejoj, kie ĝi neeviteble devas kolizii kun la instruado de ceteraj lingvoj. Invitas krei Esperanto-Diservojn kiaj okazas en Britujo.

La paroldaŭro estas limigita je du minutoj kaj la prezidanto petas la parolanton halti, kaj transdonas la parolon al S-ro Goldsmith, kiu montras ekzempleron de la gazeto *John Bull* kies eldono estas ĝis 2 milionoj da ekzempleroj. En ĝi aperis ilustrita artikolo de John Hoyle, Delegito de U.E.A. La originala maniero de ĉi tiu artikolo certe altiris multan atenton kaj estas decidite sendi dankleteron al la redaktoro de tiu ĉi multe legata periodaĵo.

Parolas nun Estrarano Petit pri la Kongreso (neokazinta) de Marseille 1940, kaj la mono restinta. Personoj kiuj siatempe pagis sian kotizon kaj deziras ricevi ĝin bonvolu sin turni al Union Espérantiste de France, 34 Rue de Chabrol, Paris X, Francujo. Post dedukto de la elspezoj tiuj tamen konsistigos nur tre malgrandajn sumojn. La templimo por repostulo de kotizo estas 30-a de Septembro. Nepostulita mono tiam iros en la kason de U.E.A.

La prezidanto donas la parolon al nia verva, vigla, volforta D-ro Lapenna, estrarano de U.E.A. Li laŭtleas rezolucion, kiu tekstas jene: "La 32-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta de la 26.VIII. ĝis la 2.VIII.1947 en Bern, kiun partoprenas 1300 reprezentantoj el 34 landoj, post detala diskuto pri la signifo kaj socia rolo de la Internacia Lingvo, decidis:

- (a) Konsiderante la atakmiliton plej granda internacia krimo, detruanta la fundamentajn bazojn de interpopola amikeco, kompreno kaj solidareco ;
- (b) Koscianta pri la fakto ke diversaj profit-avidaj grupoj deziras provoki novan, ankoraŭ pli teruran mondmiliton, preparante ĝin grandskale kaj finance kaj teknike kaj spirite ;
- (c) opiniante la Internacian Lingvon instrumento de amikeco inter la plej larĝaj popoltavoloj de diversaj nacioj kaj potenca batalilo en la lukto por demokratio kaj paco, kontraŭ ĉiuspecaj naziistaj, faŝistaj kaj duonfaŝistaj tendencoj volantaj militon ;

La Kongreso :

- (1) Kondamnas kun profunda indigno la sen-nombrajn terurajn naziistajn kaj faŝistajn krimojn, kies viktimoj estis milionoj da senkulpaj estuloj, inter kiuj miloj da esperantistoj inkluzive la familio Zamenhof, kaj konsideras esprimo de plej elementa justeco ke ĉiuj krimuloj estu senprokraste akre punitaj,
- (2) Alvokas ĉiujn esperantistojn, la Esperanto-organizaĵojn kaj la Esperanto-gazetaron senĉese plej energie kontraŭbatali la restaĵojn kaj novajn fajrujojn de faŝismo, senkonsidere al formo kaj aspekto sub kiuj

ĝi agas ; senmaskigadi la preparantojn kaj provokantojn de nova milito ; aktive subteni ĉiujn demokratajn pacajn tendencojn,

(3) Invitas la O.U.N., la internaciajn demokrat-ajn organizaĵojn kaj ĉiujn progresemajn fortojn en la mondo dediĉi la merititan atenton al Internacia Lingvo Esperanto, kiel potenca rimedo por fortikigo de solidareco inter la popolaj amasoj en mondaj kadroj.

- (1) Balkana Kontakta Komitato
- (2) Bulgara Esperanto-Asocio
- (3) Jugoslavia Esperanto-Federacio
- (4) Rumana Esp.-Societo
- (5) Aŭstria Esperanto-Federacio
- (6) Ĉeĥoslovaka Esperanto-Societo
- (7) Hungara Esperanto-Societo
- (8) Palestina Esperanto-Asocio
- (9) Asocio de Esperantistoj en Pollando

Ĉi tiuj organizaĵoj enhavas 8000 anojn.

La nun sekvanta diskutado jam transformiĝas en disputadon kaj prepariĝas neta disiĝo de du malsamaj perceptoj. Parolas S-ro Sayers, komitatano, postulante ke naciismo malaperu. Sed li alvokas al prudento. Laŭ lia sperto ekzistas bonaj homoj ĉie kaj ke la naciismo plus ĝia superbordiginta formo, la nazi-ismo, estas kondamnindaj kiel fonto de ĉio malbona en la intergentaj rilatoj. Li estas kontraŭ tiu ĉi rezolucio, kiu povos naski nur senfinajn disputaĵojn. Se oni akceptus ĝin, oni devus aldoni paragrafon pri diktatoreco kie ajn.

Petas parolon S-ro Dratwer, protestante pri malakcepto kaj eventuala transdono al la Komitato por ĝin *entirkkestigi*. Insistas ke ankaŭ la Kapitalismo kiel tonto de mizero estu vipata en la rezolucio.

Parte kontraŭas lin S-ro Applebaum, kiu rimarkigas ke per forstreko de artikolo (b) el la rezolucio, tiu ĉi perdas sian unuflankan karakteron.

S-ro Schroepel, Usono, avertas, dirante ke ni jam staras antaŭ nova milito kaj ke tiaj rezolucioj jam estas signo de dispartigo de la mondo en du blokojn.

Alian sonon aŭdigas S-ro Kohen-Cedek el Palestino, kiu elokvente postulas ke ĉie ĉesu tiu ĉi sistemo ke popolo granda regu super aliaj, malpligrandaj. Ne favoras la proponitan rezolucion pro politika karaktero. Ni restu ekster tio.

S-ro Oliver avertas pri la minacanta krizo sekve de akcepto de tiu ĉi rezolucio. Nia neŭtraleco en politikaj aferoj estus grave minacata.

La diskutado vigliĝas pli kaj pli kaj alprenas jam karakteron personan. Parolas sinsekve kontraŭ akcepto Frato Sigismondo (Franciskano), S-ro Petit, D-ro Bader kaj Hans Jakob. Kun tondra voĉo S-ro Dahl kondamnas la agojn de la teror-reĝimoj, sed rekomendas ne akcepti la rezolucion. Ni havu pozitivan ideon. Tio estas la amo. Ni kondamnu la malammon inter gentoj kaj popoloj.

Alian starpunkton evoluigas S-ro Green, ke oni nek akceptu nek malakceptu la rezolucion. Li substrekas, ke la opinioj pri vera demokratio, kiel pri la faŝismo, diferencas.

Pli malpli laŭ sama senco parolas ankoraŭ samideanoj Roseti, Zawada, Vokal, F-ino Jay ; kaj S-ro Baas deziras informon pri Esperanto en la Sovet-Unio. Pri tio informas Hans Jakob, samtempe tradukante oficialan informon pri decidota malpermeso de ĉia por-Esperanta agado en la Soveta Zono de Germanujo. Tiu ĉi informo videble impresas la ĉeestantaron. La diskutado sekvas alian direkton.

Parolas S-ro Bugge-Paulsen opinante, ke tiu ĉi ebla decido estas la malo de demokratio. Li ne povas akcepti la rezolucion kaj diras ke ni estu toleremaj.

S-ro Weeke, filozofianta, rimarkigas pri la relativeco de ĉio. La malbono venas el la suvereneco absoluta de nacia ŝtato, kiu iam kondukos al tutmonda registaro, tutmonda parlamento k.t.p.

S-ro Krolenbaum parolas pri propraj travivaĵoj kaj opinias, ke en la Sovet-Unio ne ekzistas la libereco necesa por agado.

S-ino Yelland insistas, ke Esperanto ne celas solvi sociajn problemojn ; tio iras ekster la kadron de nia afero.

S-ro Isbrücker petas fini la diskutadon kaj invitas la prezidanton, ke oni voĉdonigu la tekston.

S-ro Lapenna plendas, ke parolas ĝis nun nur la kontraŭuloj de la proponita rezolucio kaj ke li atendas de la kongresa prezidanto, ke ankaŭ li povas diri kion li opinias. Energie li defendas la proponitan tekston refutante ĉiujn diraĵojn pri Sovet-Unio, dubas pri la vereco de tio kio rilatas Esperanton en ties zono de Germanujo kaj substrekas, ke la reprezentantoj de ok organizaĵoj postulas klarecon.

La ekscito fariĝas granda, al la ekstera varmo aldoniĝas la interna, ĉiu sentas ke temas nun pri principa decido de la plej granda graveco. Post la flama parolo parolas ankoraŭ F-ino Dedieu kaj S-ro Petit. Tiu lasta subtenas la proponon de Frato Sigismondo, transdoni la rezolucion al la Komitato de U.E.A. kiu diskutu ĝin. Fine

parolas Hans Jakob, kiu opinias ke nia statuto jam klare montras, ke nia movado povas ekzisti nur sur bazo de demokratio kaj de plena libereco. Li sin levas kontraŭ ĉia perforto de opinio kaj citas la proverbon *Se ci ne volas esti mia frato, mi frakasas al ci la kapon*. Ni fine estas Esperantistoj, ĉiu kun propra opinio pri sociaj demandoj. Kio nin ligas estas Esperanto kaj la en ĝi enkorpigita interna ideo, la respekto al la homaj rajtoj, la toleremo kaj la reciproka kompreno. Li fine insistas, ke oni transdonu la rezolucion al la Komitato sen voĉdono pri ĝi.

Ĉar la subskribintoj tamen insistas je la principa decido *jes aŭ ne*, la prezidanto resumas la diversajn aspektojn de la problemo. Oni voĉdonas. Akceptas la rezolucion 40; kontraŭas ĝin 126; sin detenas 34.

La rezolucio do estas malakceptita. Ĉiuj spontanee starigas kaj kantas la himnon. Forte ĝi sonas tra la somera varmo. La Esperantista prudento venkis la tendencon politikigi nian movadon. En parlamenta lingvo oni nomas tion *enterigo kun honoro kaj muziko*.

Prezidanto Malmgren resumas la diskutojn en la Komitato kaj informas, ke ĝi laboras nun pri la restarigo de prelegoj de bonkonataj specialistoj pri iu faka temo kun postaj diskutoj. Tio devos jam funkcii en Malmö.

Poste, D-ro Kempeneers prezidas dum S-ro Malmgren faras tre interesan paroladon pri faka laboro.

S-ro Midas transdonas la salutojn de Internacia Amikeca Ligo, informas pri ties celo kaj invitas Esperantistojn je kunlaboro en tiu ĉi interesa ligo.

S-ro Petit substrekas, ke oni devus kunigi membrecon de U.E.A. kun tiu de fako.

Tion aprobas S-ro Filiâtre en la nomo de la Esperantista organizajo P.T.T. Li invitas, ke oni studu la problemon de la faka movado Esperantista kaj certigas sian kunhelpon.

S-ro Zawada proponas ke oni konstruu Esperantistan Hejmon en Varsovio kaj klarigas sian ideon.

S-ro Dratwer sciigas, ke la Pola Fervoj-Ministerio per cirkulero rekomendis al la personaro lerni Esperanton. Li opinias, ke partoprenado en la kongreso ĝenerale estas hazarda, bonŝanca, kaj ke tio deprenas de la valoro de la farataj decidoj. Li proponas ke oni kreu specon de parlamento kun elektitaj delegitoj kun voĉdonrajtoj.

S-ro Vokal diras, ke estas tre malfacile pagi ĉion el la kotizoj de la organizitaj Esperantistoj. Li proponas, ke oni agu kiel en Aŭstrujo. Kreu societon de Amikoj de Esperanto kies kotizoj,

ĉar ili ne estas ligataj kun kia ajn konkura servo, povas doni la necesan monon por la propagando.

D-ro Kempeneers apogas la proponon de S-ro Dratwer. Citas la statuton el kio vidigas ke la kongreso estas ia parlamento, sed ke ĉiu ĝia decido estas submetata al definitiva voĉdono de la Landaj Asocioj.

La tagordo de tiu ĉi kunsido estas elĉerpita. Oni desiras kun la sento, ke ni staras ĉe vojkruĉigo en la movado. De ĝenerala vidpunkto tiu ĉi diskutado estis tre utila, iurilate ĝi estis ia fulmotondro, kiu forigas la premon de malcerteco kaj de malklareco. Ni nun scias precize kie ni staras!

La Ferma Kunsido

Ĉio pasas, ĉio finiĝas, eĉ la plej bela kongreso. Lastfoje la kongresanoj kolektiĝas en la Granda Salono de la Kazino, ornamita per la flagoj de ĉiuj landoj, kun la grandega flago Esperantista en la mezo, pendanta de la kupolo.

Je la deka horo Prezidanto Buchli malfermas la kunsidon. La Prezidanto koncize resumas la faritaĵojn dum la nuna kongreso, citas la partoprenon de Esperantistoj de la ekstremoj de nia terglobo, Nov-Zelando ĝis Islando, eĉ de aŭtentika nigrulino el Sieraleono. Li mencias la komplikajojn en la organizado, la batalo kontraŭ vizo kaj devizo, la loĝado, la manĝigado. Neniam antaŭe kongreso konis tiajn malhelpejojn, kaj oni bezonis anĝelan paciencon kun trankvila animo por ne perdi la kuraĝon. Sed ĉion oni venkis kaj la rezulto estas ja bonega. La unua postmilita kongreso estas en si mem ia vojontrilo, ia direktodonanta manifestacio. De la materia organizo multe dependas la morala sukceso kaj tion komprenis la kunlaborantoj en la Loka Kongresa Komitato. La 32-a solvis la problemon de la organizo, denove estas nur unu organizajo sub la malnova nomo U.E.A. Sin turnante al la nova prezidanto de U.E.A., S-ro Malmgren, la Kongresa Prezidanto gratulas lin kaj bondeziras al li pro lia elekto, kaj esprimas konvinkon, ke li scios majstri la situacion.

S-ro Malmgren konigas la decidon de la Komitato transdoni al la du Honoraj Prezidantoj de U.E.A., S-roj Bastien kaj Kürsteiner, ian memorajon. El ĉiuj ideoj oni elektis la plej originalan, argilan pladon kolorigitan, kun la emblemoj Svisa kaj Berna kaj super ili la verda stelo. Ili portos surskribon

Por Fidela Servado

Universala Esperanto-Asocio

Post invito de la prezidanto, S-ro H. Jakob klarigas detalojn kaj montras similan objekton. La kongreso aprobas la proponon, kies plenumon akceptas S-ro Liechti, prezidanto de la Svisa Societo.

Kun elkoraj vortoj, S-ro Malmgren sin turnas al la du honoritoj kaj deziras al ambaŭ multjaran ripozon. (Aplaŭdego).

La Ĝenerala Sekretario, S-ro Goldsmith, nun informas pri la rezulto de la loterio. Gajnis premiojn: S-ino L. Bodmer, Zürich; S-ro Walther-Born, Gerlafingen; S-ro Vasilief, Kopenhago; S-ino Holmes, Londono; F-ino Rietmann, Herisau; S-ino Bolton, Dorchester; S-ro Wright, Bolton; S-ro J. Snarberg, Göteborg; S-ro Holmes, Londono.

La parolvico nun estas al la Vicprezidanto de U.E.A., D-ro Kempeneers, por raporti pri la laboroj de la Komitato. En ses kunsidoj kun preskaŭ 20 laborhoroj, la Komitato kaj Estraro prilaboris tagordon de 18 eroj, pri la kunfandiĝo, elekto de la nova komitato kaj de la estraro, prezidanto, vicprezidanto, pri la statuto, pet-skribo, financoj kaj aro de demandoj nepre solvataj. Por la komitatanoj la unua postmilita kongreso verdire ne estas senrezerva plezuro. Ili devas perlabori sian titolon! Sin turnante al S-ro Bastien kaj S-ro Malmgren, D-ro Kempeneers dankas ilin pro la montrita pacieneco kaj anim-trankvilo dum tiuj kunsidoj, varmegaj en du sencoj. Ĉiuj komitatanoj, kiuj partoprenis la kunsidojn, reiros kun la sento esti farinta utilan laboron.

La ferma kunsido de la kongreso tradicie aŭdas la raportojn de la apartaj kunsidoj. Kiel unua parolas la prezidanto de la Akademio kaj Lingva Komitato,

S-ro Ir. G. Isbrücker,

kiu raportas pri la laboroj de la lingvaj institucioj post la militfino. Li memorigas ke estis en Bulonjo kie en 1905 la unua kongreso akceptis la proponon de D-ro Zamenhof krei sendependan aŭtoritaton prilingvan, el kio naskiĝis la Lingva Komitato kaj la Akademio. La dua militado haltigis la laboron kaj nun estas la tasko de la prezidanto retrovi la komitatanojn kaj reorganizi ĉion. Okazis dum tiu ĉi kongreso kunsido de kelkaj komitatanoj, kiuj fiksas la laboron de la reorganizo.

S-ro Isbrücker samtempe informas pri la kunsido de Universala Ligo, en kiu S-ino Isbrücker kaj Andreo Cseh klarigis la celon kaj ĝisnunan laboron de tiu ĉi ligo.

Parolas S-ro Ager pri la kunsido de la Kooperativa Ligo, en kiu oni elektis Estraron kun Honora Prezidanto, D-ro Edmond Privat, Prezidanto S-ro A. A. Ager, kaj Sekretario S-ro Zawada.

Pri la ĵurnalistoj parolas S-ro Raymond, klarigante ke la Asocio akceptas profesiajn

ĵurnalistojn kiel membrojn (kategorio A) kaj liberajn ĵurnalistojn, ekzemple la redaktorojn de Esperanto-periodaĵoj, kiel anojn de kategorio B.

F-ino Jeanne Dedieu legas la rezolucion akceptitan en la kunsido de la instruistoj. La rezolucio emfazas la konstaton pri la grava malhelpo kiun kaŭzas malsamlingveco, ke ne sufiĉas la naciaj lingvoj, kiuj estas tro malfacilaj por ebligi ĝisfundan ellernon, kaj altiras la atenton al la rezultoj ricevitaj pere de Esperanto. Invitas la gekolegojn instruistajn interesiĝi pri Esperanto kaj mem sperti la altan pedagogian valoron de tiu ĉi instruado.

Pri la kunsido de la poŝt-telegraf-telefonistoj (P.T.T.-anoj) raportas S-ro R. M. Frey, kiu samtempe dankas Svislandon pro ĝia grandanima helpo al suferantaj popoloj.

Mallongan raporton pri la kunsido de la Tutmonda Esp. Kuracista Asocio legas D-ro Kempeneers. Estas decidite restarigi per ĉiuj fortoj la iam florantan Asocion, eventuale reapereiĝi fakan gazeton, kaj studi la eblojn kunlabori ĉe la intelekta kooperado, fako de U.N.O.

S-ro Ant. Schwartz legas raporton pri la policfaka kunsido. Restarigo de la Internacia Polica Ligo estas principe decidita, sur la bazo de landaj sekcioj.

Raporton pri la kunsido de Internacia Scienca Asocio Esperantista prezentas S-ro Makkink. El ĝi oni ekscias pri la laboroj por restarigi tiun ĉi Asocion. Oni sentas la urĝan bezonon de scienca periodaĵo kiel interligilo. Dum la kunsido D-ro Neergaard atentigis pri la eldonota lingvosciencia gazeto *Esperantologio*.

La bone konata radioparolanto de Praha, S-ro Malik, informas pri la fondo de ligo inter la regulaj Esperantaj radioparolantoj. Dankas al ĉiuj kiuj skribis al Radio Praha okaze de dissendo, kaj rimarkigas, ke estas ĝuste Radio Praha kiu la unua elsendis Esperanton post la milito. Transdonas la salutojn de kunhelpantoj, Rud. Hromada kaj Bartošik. Esperas, ke la Universala Kongreso okazos en 1950 en Praha.

(En unu el la venontaj numeroj de nia gazeto aperos koncizaj raportoj pri tiuj kunsidoj, kiuj ne sendis reprezentanton en la Ferma Kunsido).

Sekvas kelkaj komunikoj inter kiuj invito al Esperanta Tago en Gdansk, Polujo. Poste S-ro Strönnö konigas la inviton, cetere jam akceptitan, por Malmö, loko de la 33-a kongreso. Li certigas, ke la Svedaj Esperantistoj klopodegas ĉiel por ke la 33-a estu inda sekvanto de la 32-a. (Forta aplaŭdo).

Starigas S-ro Malmgren por doni lastajn vortojn al la kongresanoj, esprimon de danko al ĉiuj kiuj

kunhelpis ke tiu ĉi unua postmilita kongreso fariĝu inda manifestacio. Dankinte al la lando, al la Svisa registaro, al la urbo Berno, li sin turnas al la motoro de la kongreso, Direktoro Buchli, danke al kies energia gvido de la aferoj, ĉio plej bone sukcesis. Li dankas la kunhelpantojn en la Loka Kongresa Komitato, ĝian sekretarion S-ron Nicolaisen kaj al ĉiuj kongresanoj. Kaj laste sed ne malpleje, koran dankon al la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. S-ro C. C. Goldsmith, kiu dumjare ne evitis penon kaj klopodon por la Asocio kaj la kongreso. Li finas per la tradicia deziro : Ĝis revido en la venonta kongreso !

Parolas ankoraŭ reprezentanto de la Ĉeĥoslovaka ministro en Bern, salutante la kongreson kaj dezirante bonan evoluon al nia laborado. (Aplaŭdo).

Telegramo el la Administra Centro de U.E.A. en Rickmansworth dankas la salutojn perradiajn el Interlaken, hazarde kaptitajn de redakcia sekretario Mason Stuttgart.

Alproksimiĝas la fino. Prezidanto Buchli, ĉiam bonhumora kaj vigla, dankas al ĉiuj, kunhelpantoj, kongresanoj, komitato kaj kritik-emuloj. Li deziras ke ĉiuj hejmenvenu kun bonaj impresoj pri ĉio spertita. Longa aplaŭdo sekvas la adiaŭ-vortojn.

Eksonas la orgeno. Firme kaj decide sonas la *Espero*, la kanto de la pacaj batalantoj. Mansigno de la prezidanto. Malrapide falas la grandega flago kun la verda stelo. Du ĉarmaj fraŭlinoj en la belega kostumo de la Emmenthal, prenas la flagon kaj transdonas ĝin al la Sveda reprezentanto, S-ro Strönné. Lasta orgenludo.

La 32-a Universala Kongreso de Esperanto estas finita.

La Diservoj

Redaktoro de raporto aŭ priskribo de la Kongreso estas iurilate ia *ĉie-ajn-estulo*. Li devus raporti pri ĉio kio okazas, sed samtempe ĉeesti kunvenojn je sama horo, tio tamen ne estas ebla. Neniu raporto venis al la redakcio pri la diservoj Katolika kaj Juda, kaj ni tial povas diri nur, ke ili okazis.

Dimanĉon posttagmeze la tuta kongresanaro pilgrimas al la Berna *Münster* kie okazas ĝenerala diservo. Ni konstata, ke por Kristano, kiel ankaŭ por ne-Kristano, tiu ĉi horo de meditado kaj deturniĝo de ĉio tera estas edifa momento. Ideriĉa prediko de nia samideano Pastro Waldvogel formas la kernon. Li elektas kiel temon la epistolon de S-ta Paŭlo al la Korintanoj, 13-a ĉapitro. Ĉiu kiu posedas la Novan Testamenton en Esperanto volu relegi tiun ĉi ĉapitron. Ĝi ja traktas pri io kio nin interesas

tute speciale. Tio estas la kapablo paroli fremdajn kaj nekonatajn lingvojn, la *glosolalion* de la Grekoj. La apostolo aldonas : "se mi parolus la lingvojn de homoj kaj eĉ de anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro kaj tintanta cimbalo." Bonega parolo ! Ĝi volas diri, ke sen amo, sen toleremo, sen kompreno pri la bezonoj de nia proksimulo, nia penado por la internacia lingvo estas vana.

Apartan signifon tiu ĉi diservo havas ankaŭ pro alia kaŭzo. Laŭ la kutimo okazas mon-kolekto. Pastro Waldvogel skizas la mizeron en apudaj landoj, la sennombrajn petojn de malsatantaj Esperantistoj, la kreon de Svisa Esperantista Interhelpo. Formiĝis komitato inter la Svisoj por respondi al tiuj petoj. Zorga esploro garantias la ĝustan kaj justan dividon de la kolekto. Ĉiu donu laŭpove por ke malfeliĉuloj ricevu eron de nia ĝojo, de ni kiuj ne malsatas, kiuj ne vivas inter ruinoj, kiuj ne konas la ĉiutagan zorgon pri peco de pano kaj kelkaj terpomoj.

Pastro Waldvogel finas tiun ĉi belegan predikon agrable parolitan, per la vortoj,

"Restas nun fido, espero kaj amo, tiuj tri, kaj le plej granda el ili estas amo. Ni sekvu amon por ke la mondo kreu kaj esperu."

La Distraĵoj de la Kongreso

La Loka Kongresa Komitato ja havis tre bonan intencon, ĝi nepre volis gajni la bonvolon de la kongresanoj, kaj aranĝis tiom da plezuraĵoj, ke neniu efektive rajtas plendi pro manko, sed pro riĉeco. Krom la interkonatiĝa vespero, neabela, sed babila turo ! oni aranĝis Prelegvesperon de Esperanto-verkistoj (28-an de Julio), en kiu brilas niaj verkistoj Baghy kaj Kalocsay. Belega kaj tute senripoĉa estas la koncerto, mardon vespere, kiun donas tri steloj de la Esperantist-artista firmamento, nome violonisto Johano Geryk (Ĉeĥoslovako), S-ino Marguerite Sautreuil, sopran-kantistino de Parizo, S-ro Frank Merrick, pianisto (Anglo). Ha, kia regalo por muzik-amanto ! Verkojn de Gounod, Grieg, Ireland, Dvorak, Puccini, Berlioz, Bach, Smetana, Chopin, Svendsen, Chopinier, kaj Sarasate. La artistoj donas ne nur multon, sed ĉion. Koran, elkoran dankon al ili. Jam tiu ĉi vespero riĉe kompensas nin.

La Varietea Vespere estas io Esperantista. Ĝin enkondukas Bèla Berceľ Bleier, kaj kunlaboras Julio Baghy, Kalocsay, Tárkony, Verda, kaj F-ino Géczy. Poemoj, surprizaĵoj de ĵonglisto-sorĉisto, "decaj" poemoj de Raymond Schwartz (ni esperu, ke li ne plendos pri tiu ĉi distingiĝo !), bonhumoraĵoj de Baghy, kaj fine prezentaĵoj de dancartistino.

Sed la zeniton atingas la tradicia internacia balo en la granda salono, jaŭdon vespere. Mirigite la loĝantaro vidas alveni en la kongresejo nacie kostumitajn kongresanojn, inter kiuj la Ĉeĥoslovakaj sendube plej distingigas apud Svedaj, Norvegaj kaj Svisaj. Eĉ la serioza redaktoro de ESPERANTO surmetas Ĝenevan kostumon kaj certe serĉas ioman ŝanĝon de atmosfero. Ni konstatu tamen, ke la partopreno en la amuzajoj estas en rekta kontrasto kun la partopreno en la laborkunsidoj. Tio decidigas komitatanon proponi, ke estontece oni anoncu plezurajon, sed poste fermu la pordojn kaj faru laborkunsidon. Brila ideo!

La Ekskursoj

Ni baptis la kongreson la kongreso de la kunfandiĝo. Laŭ disvastigita kutimo infano povas havi plurajn baptonomojn aŭ voknomojn. Iuj opinias, ke la 32-a estas *ŝvitiga* kongreso, aliaj volus nomi ĝin *biera*, pro la konsumado de tiu ĉi senkulpa trinkaĵo, cetera bonkvalita en Berno. Ĝi estas ankaŭ *ekskursa* kongreso. Krom la kutimaj rondveturoj tra la kongresurbo, konforme al la maksimo *diverso ĝojigas*, okazis ne malpli ol 16 grandaj ekskursoj. La partoprenintoj ĝenerale estas kontentaj, pri kio multe kontribuis la senescepte belega vetero kiu regis dum la tuta semajno. La ekskursantoj al Jungfraujoch ja ne forgesos tiun ĉi belegan okazaĵon.

Aliaj Arangoj

Inter la aliaj arangoj, sendube la prelegoj pri Universala Ligo (kun filmo), la prelego pri Svedlando (kun filmo) en kinoteatro Kapitol, la prelego pri "Parizo Okupita, Parizo sin liberigas, Parizo invitas al Internacia Konferenco", pri Varsovio, pri Nov-Zelando (kun lumbildoj) estis ŝatinda kompletigo.

Iom da Statistiko

Aliĝis al la kongreso 1372 personoj el 36 landoj. Partoprenis iom pli ol 1200. Okazis Interkonatiga Vespere, Malferma Kunsido, tri Labor-kunsidoj, kaj Ferma Kunsido. La Komitato kaj la Estraro de U.E.A. kunvenis sesfoje kun tagordo el 18 eroj kaj prilaboris ĉion en 20 horoj. Tri diservoj, el kiuj unu estis ĝenerala.

Okazis pli ol 30 kunvenoj de 19 diversaj fakaj, specialistaj organizaĵoj. Oni organizis 16 grandajn ekskursojn al plej diversaj lokoj en Svislando kaj ĉiutage rondveturojn tra la urbo. Koncerto, Varietea Vespere, 5 prelegoj kun lumbildoj.

Pri la konsumado de trinkaĵoj dum tiu ĉi semajno fare de la Esperantistoj, fidindaj ciferoj ne estas riceveblaj.

Hans Jakob

ESPERANTO EN RADIO

Redaktas S-ro A. C. Oliver, 57 Woodland Road, Maple Cross, Rickmansworth, Anglujo, al kiu oni sendu senescepte ĉion pri ĉi tiu rubriko

Mallongigoj: I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso

Ĉiutage	15.30-15.45	Praha. 1935m. kaj 31.41m. P.
	21.00-21.15	Praha. 49.92m. P.
Lundo	11.30-11.40	PRG2 (Brazilo). 104m. P.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. Prelegoj, intervjooj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.30-22.35	Budapest I. 549.5m. I. Hungara Radio, Budapest VIII, Bródy Sándor u. 7.
Mardo	18.50-19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
	20.50-21.00	Ostrava. 259m. Radiostacio, Ostrava, Bráfova 5.
Merkredo	5.35-5.45	Wien I. 506.8m. K. RAVAG-Wien, 30a Argentinierstr., Wien IV.
	10.15-10.35	Paris. 431.7m. K.
	21.10-21.25	Warszawa III. 49.06m. I. Pola Radio, Warszawa, Koszykowa 8.
	22.30-22.35	Budapest I (kiel je lundo).
Jaŭdo	16.50-16.55	Wien II. 31m., 41m. kaj 228.6m. I. RAVAG-Wien.
	17.45	Bern. 47.28m. P. de D-ro Privat. Societo Svisa de Radio-dissendo, Bern.
	18.45-19.00	Hradec Králové. 280m. Vychod-očeky vysílá, Hradec Králové, Ĉeĥoslovakujo.
	20.50-21.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
	20.50-21.00	Ostrava. 259m.
Vendredo	18.50-19.00	Sofia. 32.9m. P. Radio Sofia.
	22.30-22.35	Budapest I (kiel je lundo).
Sabato	19.00-19.45(?)	PRA2 (Brazilo). P. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da República, Rio de Janeiro.
	20.00-20.30	PRL 3 (Brazilo). 49.75m. P. "Brazila Kroniko", Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo signifas ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. Ni petas informon pri necesaj aligoj. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratulleterojn kaj informojn pri ricevo.

Berna Kongreso

Pro manko de spaco la raporto pri la fak-kunvenoj dum la 32a ne povis aperi en la nuna numero. Ili aperos en la sekvonta eldono, n-ro 504, Oktobro 1947.

ENIGMA KONKURSO N-ro 19

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 106 rue Général Lotz, Brussel-Uccle, Belgujo


Solvoj de la enigmoj en Konkursio N-ro 17

N-ro 41 : Horizontale oni legas: agl, vanel, rad, kler, rap, pino, tatui, polemik, tabak, siren, k, remil, mon, k, lign, rikan, ia, oni, tarok, tub, ag, pesil, kana, k, pot, kerub, n, papav, rolul, kanonik, deriv, orel, lok, reto, mol, raket, tol.

N-ro 42 : kat, falk, alk, kapr, apr, mul, akar, karp, kamel, kameleon, mel, leon, kardel, arde, ran, lar, menur, ur, perk, ostr, blat, abel, lojt, rat, salikok, kok, milv, dog, merl, merlang, pig, kol, pirol, lup, paser, pork.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la dekkvina konkursio: S-ino N. Koudijs-Modoo (Ned.) 97, F-ino B. Howell (Brit.) 91, S-ro T. K. Slade (Brit.) 86. Sekvas post ili: S-ro J. S. Dinwoodie 82,5; S-ro H. de Kuyser 80; S-ro A. E. Rosengaard-Hansen 79; S-ro B. S. Trier 78; S-ro Fr. Taylor 76; S-ro Ed. Decaneva 71; F-ino E. Jayet 65; S-ro P. E. Schwerin 64; S-ro A. H. v. d. Broek 63,5; S-ro R. V. Salles 60.

Enigmo N-ro 43 : Krucvortenigmo. Mi avertas la solvantojn, ke la klarigoj kelkfoje estas iom fantaziaj. La vortoj komenciĝas kaj finiĝas ĉe dika linio.



Horizontale : A.1. Tri insektoj kiuj povus fari ŝtrumpojn. B.1. Nesimpla gaso; 5. Formulo, teksto. C.2. Tia estas vagada parolado aŭ impresbla homo; 9. lirika poemo(r). D.1. Restigi senŝanĝe(r); 4. eklezia regulo(r); 9. vida 5.A. E.1. Tia ŝlosilo ĉion malfermas; 4. prepozicio; 6. membra, inversigebla. F.1. Patro de patro(r); 3. krudaĉa homo(r); 7. silika

juvelŝtono(r). G.1. Granda spongeca glando(r); 5. prefikso; 7. ŝtoneca tavolo. H.2. Senkapigita insekto(r) per kiu komenciĝas granda afero; 5. skuetiĝis. I.1. Teksaĵo; 5. Konigi bezonatan sciigon. K.2. Nemensoga kantitaĵo produktanta spritan laboron.

Vertikale : 1.A. Dufoje vigla, iufoje malrapida, ĉiam montranta ĝentilecon; F. komprenita de batito. 2.A. Postulata de servo(r); H. disigita revo(r). 3.A. Moviĝe; D. La senkapigita junulo rotacias(r); G. kiel H.2. 4.A. Bagatela marborda peco aŭ granda militaĵo(r); H. malgranda trueto(r). 5.A. Prefikso; C. kune kun D.9 danco kiu memorigas pri ŝipo; F. pikema vegetaĵo(r). 6.A. Kiel G.1; F. rilata al spasma elspiro. 7.A. Participa sufikso; C. naskita el mono; G. kaŭzi lacecon(r). 8.A. Kia estas respondo de Molotov; D. legomo kun tubera radiko; H. tute fantazia imagaĵo(r). 9.A. Geografia priskribo pri montoj(r); I. duono de korta birdo. 10.A. El blue grizaj folietoj kun metala brilo; E. laŭcele eniras truon, sed ne por ŝtopi ĝin(r).

Enigmo N-ro 44. El du faru unu. El la literoj de ĉiu paro de vortoj povas esti formata nova vorto. La komencliteroj de tiuj novaj vortoj formas kun la kvinaj literoj konatan esprimon.

1. moki – pano; 2. torni – sidu; 3. turo – revu; 4. certa – pino; 5. bleki – spuro; 6. rumo – bono; 7. daŭri – sono; 8. fea – lento; 9. reĝa – nu; 10. brido – tro; 11. rano – ardi; 12. dreni – sate; 13. plenumo – sate; 14. cinamo – egale; 15. hejti – volumo; 16. lato – arogi; 17. viskio – vice.

Enigmo N-ro 45. Por internacia Esperanto-kongreso la komitato aranĝis teatran prezentadon. Ĉe la komenco de la prezentado evidentiĝis, ke estis 80 malplenaj sidlokoj en la teatro. Certa nombro da kongresanoj ne ŝatis teatran prezentadon aŭ estis malhelpata. Se ĉeestus la prezentadon tiom da kongresanoj, kiom forrestus, la nombro de neokupitaj lokoj estus la dektrioblo de la vera nombro da neokupitaj lokoj, kaj la nombro da forrestintoj estus la kvinoblo de la vera nombro. Kiom da kongresanoj ĉeestis la kongreson? Bonvolu trovi la solvon per nura argumentado, do, ne uzu algebrajn ekvaciojn. Por ĉiu korekta solvo mi donos 5 poentojn.

RIDO SANIGAS

Kolekto de anekdotoj
9p. aŭ 3 respondkuponoj
Mendu ĉe U.E.A.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 197

9an de Aŭgusto 1947

NOMO

La nova statuto estas akceptita kaj sekve la nuna oficiala nomo de la organizajo estas Universala Esperanto-Asocio.

KONTRAKTO PRI KUNLABORO

Konforme al la Statuto la Estraro faris Interkonsenton pri Kunlaboro kun Tutmonda Junular-Organizo.

HONORA MEMBRO

Dum la kunsidoj en Bern la Komitato nomis S-ron P. Balkanyi, nian Ĉefdelegiton en Hungarujo, Honora Membro de la Asocio.

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Sydney (N.S.W.). FD (Religio) : Pastro I. Serisev, G.P.O. Box 2988.

Aŭstrujo

Ĉefdelegito : Rajmund A. Cech, Lindengasse 8-II/ii, Wien VII/62.

Britujo

London. FD (Socikredito ; Naturkuracado) : J. W. Leslie, 50 Hillfield Park, Muswell Hill, London, N.10. Tel : TUDor 1769.

Ĉeĥoslovakujo

Mistrin. FD (Junularo) : Buhumil Toman, Mistrin apud Kyjov.

Novy Jiĉin. FD (Muziko ; Arto) : Jan Geryk, Stalinova 3.

Danujo

Skovby. FD (Abelkulturo) : Niels Ravnsbjerg, Skovby, Videbaek, Jylland.

Valby. FD (Lingvoj ; Ekonomio) : N. Liventhal, Strindbergsvvej 36, København-Valby.

Finnlando

Hyrnsalmi. D : S-ino Toini Tolvanen.

Lapua. D : Toivo Matilainen, Lapua, Kinohovi.

Nummi. D : Sulo Salonen, Sierla, Nummi. Tel : 96.

Paimio. D : Veio Liljeblad, Paimio, Kansanopisto.

Germanujo

Wiesbaden. D : K. Schönnrich, Scharnhorststr. 26-I.

Hispanujo

San Fernando. D : J. Garzón Ruiz, Str. Muñoz Torrero 10. Tel : 238.

Italujo

Bologna. FD (Studentaj aferoj) : U. Broccatelli, Via del Chiu 7.

Roma. FD (Inĝenieraj aferoj ; Filatelo) : D-ro B. Lattanzi, Via Casilina 5.

Madejro

Funchal. VD : Manuel Amândio Rodrigues, Blandy's Bank. Tel : 1.227.

FD (Bankaj aferoj) : V. Vitorino Pereira, Banco Nacional Ultramarino. Tel : 629.

FD (Filatelo) : J. Julião Cardoso, Caminho de D. João 19.

FD (Industrio) : F. Ferreira, Rua do Coronel Cunha 9.

FD (Komerco) : Manuel de Gouveia, Rua do Bom Jesus 4.

Nederlando

Breda. FD (Sporto) : S. van Gils, Valkenierslaan 40. Tel : K 1600-9407.

Vught. D : Frato Wigbertus van Zon, Huize Steenwijk Boxtelse Weg A 76. Tel : (K4100) 8364.

Portugalujo

Paço-Laura. D : Fernando Costa, Paço-Laura, Matosinhos.

Tramagal. FD (Radio) : M. Dôres Mendes.

Rodezio

Gt. Zimbabwe. FD (Kristanismo, evangelia) : J. Semmelink, Morgenster, Gt. Zimbabwe, S. Rodezio.

Usono

Bloomington (Indiana) : D : H. French, P.O. Box 501. Tel : 4298.

Fort Lee (N.J.). D : G. Gabor, 1021 Ponsi Street. Tel : 8-0065M.

ŜANĜOJ

Aŭstralio

Ĉefdelegito : Nova adreso : 37 Seymour St., Croydon, N.S.W.

Brazilo

Santos. D : nova adreso : Rua Bahia 57.

São Paulo. FD (Etnologio) : nova adreso : Caixa postal 5459.

FD (Laboristaj aferoj) : nova adreso : Rua Tumiaru 197.

FD (Ludiloj) : nova adreso : Caixa postal 2585.

Britujo

Isleworth. D : vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Brno. VD : vakas.

FD (Muziko ; Arto) : vakas.

Prostejov. FD (Junularo) : vakas.

Danujo

Vejle. FD (Turismo ; Migrado) : nova adreso : Fundersvej 2.

Finnlando

Nilsä. D : la nomo de la delegito estas Pekka Pentikäinen.

Italujo

Torino. FD (Komerco) : nova adreso : Via Lombroso 28.

Nederlando

Ede. D : nova adreso : Stationsweg 55.

Sud-Afriko

Pretoria. D kaj FD : vakas.

Usono

Burbank. D : vakas.

Greenfield. D : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1947

280. S-ro R. W. Rayner, Nairobi, Kenjo.

281. S-ro A. Retti-Marsani, Gevelsberg, Germanujo.

282. S-ro M. Gasowski, Warszawa, Polujo.

283. S-ro F. Kropielnicki, Gdansk, Polujo.

284. S-ro A. Zaporoshetz, Hersfeld, Germanujo.

285. S-ro E. Ducommun, Les Brenets, Svisujo.

286. S-ino I. Schweingruber-Gewürtz, Genève, Svisujo.

287. S-ro P. Kulozik, Katowice, Polujo.

DONACOJ : S. Jasinskas 2ŝ. 6p.

DONACOJ por helpi al la kosto de la Petskribo : T. Griffiths 2ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

Jarlibro—La unua parto jam elĉerpiĝis, ĉar la presisto ne povis liveri la menditan kvanton pro manko de papero. Li esperas baldaŭ fari represajn kaj ni dissendos ŝuldatajn ekzemplerojn kiel eble plej baldaŭ.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la 31 de Julio 1947, kaj ankau, por komparo, je la fino de Julio 1946 :

	1946	1947
Asociaj membroj ..	6220	6986
Individuaj membroj :		
MJ ..	974	973
MA ..	3907	4835
MS ..	247	285
Patronoj ..	24	22
DM ..	95	147
HM ..	20	52
	5267	6314
	11487	13300

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

AŬSTRUJO

Internacia Esperanto-Muzeo

Post 9-jara paŭzo la Muzeo denove funkcias. Post la invado de Hitler en 1938 la Muzeo estis fermita kaj la fondinto kaj direktoro, S-ro H. Steiner, enkarcerigita. La kolektoj tamen estis konservataj kaj oni disponigis 4 belajn ĉambrojn en la iama imperiestra kastelo. Ĉiu materialo post 1938 mankas, kaj oni tre bonvenigos kiujn ajn sendaĵojn kiuj forigos la mankon. Oni kvitanco ĉiun sendaĵon. Sendu al Internacia Esperanto-Muzeo, Wien I, Hofburg, Reichskanzleitrakt, Aŭstrujo.

Turista Ligo "Naturamikoj"

La nomita ligo akceptis Esperanton kaj starigis Esperanto-fakon, kies gvidanto estas J. Eder en Graz. En la organo *Naturfreund* kaj en la bultenoj de la estraro aperos informoj pri Esperanto.

Informojn de Turista Ligo 'La Naturamikoj', Esperanto-fako, GRAZ, Stempfergasse 6/1.

Filatelio

La Esperanto-eldonejo "Tramondo" eldonis kvarpaĝan prospekton kun represajoj de la 28 poŝtmarkoj de Aŭstrujo, kun klarigoj en kvin lingvoj, inkluzive de Esperanto. La kosto estas 1 respondkupono. Tramondo, Neutorg. 9, Wien I.

DANUJO

Internaciaj FERIAJ Esperanto-kursoj

La kursoj okazos 12-15 de Oktobro en la Sporta Altlernejo en Vejle. Oni varme invitas samideanojn el la eksterlando. Petu prospekton de L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj.

GERMANUJO

Okaze de la 60-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto, la Esperantistoj en Hannover aranĝis je la 21-a de Junio indan feston. Ĉeestis pli ol 500 personoj kaj la afero estis granda sukceso. Kantis la himnon Otto Fuchs kaj universitata profesoro D-ro Saribek Agamjan el Persujo parolis pri *Esperanto la ponto al la mondo*. La paroladon tradukis S-ro Schalmey el Hannover. La radio Hamburg raportis pri la festo kaj disaŭdigis en la *Eŝo de la tago* la unuan strofon de la himno.

De la 25-a de Junio ĝis 8-a de Julio 130 el la festintoj partoprenis ĉe-kurson de S-ro Weide el Hamburg.

S.L.K.

HUNGARUJO

En la urbo Szeged oni enkondukis Esperanton en la Universitaton jam de la pasinta semestro de la studjaro 1947. Oni komisiis kiel lektoron E. Farkas, kiu instruas la lingvon po du horoj en semajno. En la venonta semestro li instruos la lingvon po 4 horoj en semajno.

Por fondi seminarian bibliotekon ĉe la universitato, oni petas la alsendon de ĉiuspecaj Esperantaj gazetoj, periodaĵoj kaj libroj. Eĉ naciingvajjn oni akceptas se ili traktas la lingvon internacian.

En la sama urbo oni ĵus organizis—Skoltaj Esperantistoj kaj Laborista-Esperantista Grupo—sukcesan ekspozicion.

J.B.

Ĉeĥoslovaka Sokol-Movado

Prepare por la granda manifestacio de 1948 en Praha, la Sokol-movado de gimnastiko eldonis duan Informilon en Esperanto. La informilo donas multajn interesajn faktojn pri la festo. Petu senpagan ekzempleron de Sletová Kancelář, Tyršuv Dum, PRAHA III. Skribu Esperante.

NASKIĜO

Moen—Je la 7a de Aŭgusto al Ge-sroj P. Moen, Hago, Nederlando, filino, nomita Marianne.

ANIAJ MORTINTOJ

Verth—Je la 2a de Aŭgusto forpasis S-ro R. J. Verth, dum multaj jaroj Vicdelegito en Edinburgo, Skotlando.

KONGRESAJ IMPRESOJ

Malgraŭ tio, ke la Berna Kongreso jam estas pasintaĵo, ĝi tamen apartenas ankaŭ al la estonteco, ĉar la spertoj de la Esperanto-semajno donis indikojn kaj gvidon pri nia denuna agado.

Kiom koncernas I.A.P.K. ni akiris altvaloran sperton, kaj se ni ŝajne esprimas iom da nekontento pri la kongreso ĝenerale, tio estas pro la fakto, ke ni unue kaj laste estas praktika organizaĵo, kiu devas rigardi aferojn objektivaj kaj laŭ ties rilato al la faktoj de nia ekzisto.

Se oni povas montri al la homoj, ke Esperanto estas praktike valora, oni ne devas propagandi; ili mem sin okupos pri Esperanto. INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ praktike uzas Esperanton. Ni lokas la lingvon antaŭ vastan publikon, kaj dum aliaj organizaĵoj perdas siajn adeptojn, pro manko de utila okupo, ni gajnas kaj tenas niajn membrojn.

La inventisto, kiu eltrovis la principojn pri la apliko de vaporpovo, spertis mokon nur ĝis la homoj komprenis la praktikan valoron de la eltrovo, kaj en ĉiuj sferoj de eltrovo la sukceso dependas de la praktika utiligo de ideo. La Esperantistoj, kiuj atendas, ke la homoj aplikos Esperanton pro ĝia *ideo*, gardas iluziojn. La Esperantistoj mem devos pruvi ĝian valoron. Tial ke I.A.P.K. rekonas tiun bazan fakton, ĝi ekklopodis laŭ tute nova maniero. Ĝi eklaboris ĉe sekcio de la homoj, kiu jam forte bezonis internacian lingvon, kaj ĝi donis kaj donas la servon delonge sopiratan.

Unu el niaj projektoj estas eldono de Internacia Poŝtmarko-Katalogo, kaj en la momento kiam oni legos ĉi tion tiu jam estos eldonita. La jenaj faktoj pri tio estas atentindaj: la plej grava filatela pograndoisto en la Brita Komunumo de Nacioj jam akceptis la katalogon, kaj perados ĝin ĉe la tuta filatela merkato; tiu firmo dissendas 20,000 flugfoliojn pri la katalogo; nia katalogo estos aĉetebla en ĉiu filatela butikoj en Britujo kaj en centoj da butikoj eksterlande.

Nia ĉiujara kotizo (kiu inkluzivas abonon al la revuo *Universala Poŝtmarka Revuo*) estas kvin anglaj ŝilingoj (12.0 Int. Mon-Sistemo). Oni povas pagi tion per kurantaj poŝtmarkoj de sia lando. Kontraŭ pm. por afranko oni povas ricevi detalojn pri nia asocio kaj ekzempleron de la revuo. Adreso: I.A.P.K., XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo. (*Reklamo*)

LA TROVITA FELIĈO

de TIBOR SEKELJ

Novelo legebla por
Kursfinintoj.

Prezo:
9 pencoj aŭ 3 int. rpk. afrankite.

Mendu ĉe
INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

LA LIBRO DE LA SPIRITOJ

"... bonege taŭgas por ĝustigi tiujn opiniojn kaj por forigi la miskomprenojn."—*Heroldo de Esperanto*.

"... Pri unu afero mi estas tre kontenta; la lingvo estas modela."

"... Mi senhezite diras, ke laŭ vidpunkto pure lingva ĉi tiu verko estas la plej kontentiga, kiun mi ĝis nun legis en Esperanto... la frazoj portas la stampon pri instruiteco kaj ŝato pri la plej ĝusta vorto por atingi la bezonatan nuancon... La rezulto estas libro pri kiu iu ajn literaturo povus esti fiera. Por la Esperanta ĝia valoro estas netaksebla..."—*Esperanto Internacia*.

531 paĝoj, 19 × 14 cm., broŝ. 10ŝ. 6p.,
tole bind. 12ŝ. 9p., duonlede bind. 25ŝ. 6p.,
afranko 9p.

Mendu ĉe I.E.L.

SIMPLAJ LEGOLIBROJ

ESPERANTO POR INFANOJ. G. GLADSTONE SOLOMON.

Ilustrita Broŝurita 70 paĝoj

Prezo 1 ŝil 11 pencoj afrankite (8 rpk.)

JOHANO KAJ SILVIO. F. F. BETTS.

Broŝurita 48 paĝoj

Prezo 1 ŝil 2 pencoj afrankite (5 rpk.)

TEJO KAJ ĈERIK. H. G. TOMS.

Broŝurita 48 paĝoj

Prezo 1 ŝil 8 pencoj afrankite (7 rpk.)

Eldonitaj de

THE ESPERANTO PUBLISHING CO. LTD.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

EL AŬSTRUJO

Senhalte al la celo !

Facila legolibreto

ALOIS NORBERT

Prezo 1ŝ. 6p., afr. 1p. (6 rpk.)

La Mondopaco kiel psikologia problemo

HANS THIRRING

Trad. HUGO SIRK

Prezo 1ŝ., afr. 1p. (4 rpk.)

Mendu ĉe I.E.L.

PETRO

Kursa lernolibro, aŭ simpla

legolibro, por laboristoj

7-a eldono

Broŝ. 112 paĝoj

Prezo 2ŝ. 9p., afr. 3p. (12 rpk.)

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo